Ĝenerala Ordinara Jarkunsido
de la Kulturdomo de Esperanto de Grésillon
la 10an de junio 2017, komenco je 14h10

1. Nomumoj

- Prezidanto de seanco: René Jelenc.
- Sekretario: Bert Schumann.
- Administrantoj ĉeestantaj: Elisabeth Barbay, Isabelle Nicolas, Nathalie Kesler, René Jelenc, Xavier Godivier, Bert Schumann, Vito Markovo (reprezentanto de SAT-Amikaro).
- Administrantoj forestantaj senkulpigitaj: Alfred Schubert, Frédéric Dambreville, Didier Loison (reprezentanto de Espéranto France).

2. Nombrado de ĉeestantoj kaj prokuroj

La listo de partoprenantaj societanoj nombras :

- 27 ĉeestantoj (personoj fizikaj kaj moralaj).
- 68 rajtigiloj (ricevitaj per poŝto aŭ retpoŝto, inter ili rajtigiloj sen prokuro), inter ili :
  - 44 prokuroj (rajtigiloj kun nomo de ĉeestanto, maksimume 5 prokuroj por ĉeestanto).
  - 24 rajtigiloj sen nomo de ĉeestanto, nombritaj por la kvorumo.
- 27 ĉeestantoj + 68 rajtigiloj rezultigas 95 partoprenantojn (por la kvorumo).
- 27 ĉeestantoj + 44 prokuroj rezultigas 71 voĉojn por voĉdonoj dum la seanco.

3. Nombro de societanoj, kontrolo de la kvorumo

Je la 31a de decembro 2016, ekzistis 273 societanoj. La 9an de junio 2017, ekzistis 266 societanoj.
La kvorumo necesa laŭstatute de ses-ono, do 45, estas atingita.

4. Morala raporto 2016

René, Isabelle kaj poste Nathalie legas la raporton.
Diskuto pri la mikso de partiprenantoj kaj aktivecoj esperantistaj kaj ne-esperantistaj en la sama staĝo.
Diskuto pri la duobla uzo de la kastelo por luo kaj alia aktiveco.
Jeanik precizigas ke okazis luoj al ne-societanoj jam antaŭ 2010.
Kelkaj rimarkoj pri la bambuoj kaj la lavejo.
Voĉodono de la morala raporto: 0 kontraŭ, 0 sindeteno, aprobita unuanime.

5. Financa raporto 2016

René legas la raporton. François donas kromajn klarigojn.
Societanoj faras demandojn, je kiuj René kaj François respondas.
Diskuto pri la elekto de aĉetitaj libroj. Iu ajn povas proponi aĉetindajn titolojn. La libroservo konsulteblas rete en gresillon.org/libroservo.
Voĉodono de la financa raporto: 0 kontraŭ, 4 sindetenoj, 67 por.

6. Aprobo de la kontoj 2016 kaj asigno de la rezultoj 2016

Voĉdono por la aprobo de la kontoj: 0 kontraŭ, 4 sindetenoj, 67 por.
Voĉdono pri la asigno de la rezulto 2016 (12 391,74 €) konforme al la statutoj: 15% (1 858,76 €) kiel laŭleĝa rezervo, 240,84 € kiel interezoj de partoj B, sen redukto aŭ altigo de la kapitalo, kaj la saldo de 10 292,14 €, kiel fonduso de disvolvo destinata al la grandiĝo de la societo: 0 kontraŭ, 3 sindetenoj, 68 por.

7. Antaŭvida buĝeto 2017

René klarigas la antaŭvidan buĝeton por 2017.
Jeanik demandas kial oni ne pretigas monon por la laboroj - respondo: neniu financa intereso rilate al ajna impostoredukto ĉar oni jam atingas la sojlon.

Voĉdono de la buĝeto: 0 kontraŭ, 3 sindetenoj, 68 por.

8. Kvitigo de la Administra Komitato

Voĉdono de la kvitigo: 0 kontraŭ, 0 sindeteno, aprobita unuanime.
Laŭ peto de societano, la membroj de la Administra Komitato prezentas sin.
La sekvan jaron, oni novigas duonon de la Administra Komitato kaj leviĝas ankaŭ la demando pri restado aŭ foriro de la du asocioj. Diskuto pri la eblo de reelekto de la du asocioj post la 2 pasigitaj mandatoj.

9. Laboroj

Nathalie prezentas la prioritatojn de la laboroj de la tegmentoj de la kastelo kaj kromdomoj rilate al la sekureco kaj la flegado.
Diskuto pri la dormĉambroj por handikapuloj kaj ĝia lokado.
Diskuto pri la restaŭro aŭ forigo de la damaĝitaj fumtuboj.
Diskuto pri la okupo de la kastelo dum la neokupitaj periodoj (volontulo? dungito? kun kiu rolo?).

10. Diversaj demandoj

Prezento de la organismoj Rempart kaj CHAM povantaj fari laborojn en la kromdomoj je N+1 aŭ N+2 jaroj, ilia funkciado, iliaj diferencoj (dokumento konsultebla laŭ peto), ebloj kaj kondiĉoj, sekvata de aktiva diskutado.
Frédéric prezentas la projekton de necesejo por handikapulo en la tuklavejo kaj de dormĉambroj por handikapuloj en la bindejo kaj ĉambro 33.
Diskuto pri la riparado de la planko de la dormĉambro 34. Propono malaltigi la planko-nivelon ĝis la ter-nivelo.

Fino de la seanco je 20h